

---

INDICE

- I nostri prossimi venerdì
- 24-a Internacia Semajno de Kulturo kaj Turismo
- Errata corrige
- Nova eldonanto por "Heroldo de Esperanto"
- Partopreno en projekto Erasmus
- La Kongreso de la Italaj Katolikoj
- Esami finali di 1° grado per i ragazzi di Verdello
- S-ano Curnis en Milano survoje al Francio
- Ĝemeliĝas tri urboj kun siaj E-Grupoj
- Lutto
- Estrarkunsido
- Niaj pasintaj vendredoj
- Turismo per Esperanto
- Notizie dal mondo

## **Circolo Esperantista Milanese**

Via De Predis 9 - 20155 Milano - tel. 3474262214 (*solo venerdì sera*)

*e-mail:* [esperantomi@infinito.it](mailto:esperantomi@infinito.it)

*rete:* <http://milano.esperantoitalia.it/>

*C.C.P.* 26448209

*IBAN:* IT36 J076 0101 6000 0002 6448 209

## **I NOSTRI PROSSIMI VENERDÌ**

**ore 21,15**

*aperti a tutti gli interessati: soci e non soci*

### **Venerdì 1° luglio**

Come sempre è aperta a tutti la

#### **RIUNIONE DEL CONSIGLIO DIRETTIVO**

### **Venerdì 8 luglio**

#### **TRAFOLIUMANTE LA ESPERANTISTAN GAZETARON**

### **Venerdì 15 luglio**

Prima di andare in vacanza un appuntamento internazionale ci attende in sede dopo il conviviale incontro in pizzeria (h.19.30 da "Il Faraone" - Via Masolino da Panicale 13. Prenotarsi in sede o presso Rodari, tel. 02-2364190). Sarà nostra ospite la dott.ssa ungherese Berényi Zsuzsanna Ágnes che terrà una conferenza su

#### **GARIBALDI KAJ LA HUNGAROJ dum la Releviĝo**

svelandoci particolari poco noti che collegano l'eroe del nostro Risorgimento con il popolo magiaro.

## **SEDE CHIUSA DAL 18 LUGLIO AL 11 SETTEMBRE**

### **BUONE VACANZE A TUTTI!**

### **BUON CONGRESSO A FRASCATI**

### **I programmi riprendono il venerdì 16 settembre**

con la bimestrale e sempre aperta a tutti

#### **RIUNIONE DEL CONSIGLIO DIRETTIVO**

### **Giovedì 22 settembre**

Dopo la pausa si ritorna alla piacevole tradizione di ritrovarsi in pizzeria (h. 19.30 da "Ciccibello" in via degli Ailanti 3 con le solite già citate modalità) per poi ascoltare in sede, a cura di alcuni partecipanti, i

#### **RAPPORTI SUI PRINCIPALI CONGRESSI ESTIVI**

**NOTA BENE** - In attuazione della decisione presa nell'ultima assemblea, in questi ultimi mesi dell'anno i programmi importanti

(preceduti dalla cena in pizzeria) o Babbo Natale avverranno al giovedì. Nel 2017 lo saranno tutti.

-----  
**GLI "INCONTRI DI CONVERSAZIONE"** del mercoledì in sede proseguono regolarmente per tutto il mese di *giugno*. Poi verranno ripresi subito in *settembre*.

## **24-a INTERNACIA SEMAJNO DE KULTURO KAJ TURISMO**

### **Cambrils (Hispanio) - de la 1-a ĝis la 8-a de oktobro 2016**

La fama kaj tradicia renkontiĝo ĉijare okazos en la 4-stela hotelo Best Cambril - Avenuo Diputaciòn 141 - Cambrils - Tarragona, sub la aŭspicioj de Hispana Esperanto-Muzeo kaj kun la kutima interesa programo.

Ĉiujn informojn petu rekte al la ĉeforganizanto: Luis Serrano - Font Nova 32 - ES-08202 Sabadell (Barcelono). Telefono: (34)937275021-

Atenton! Ĉiuj pagoj estos surloke ĉe la hotelo de Cambrils, sed la aliĝilon sendu rekte kaj eble pli frue al s-ro Luis Serrano.

## **ERRATA CORRIGE**

Nel precedente numero, nei risultati elettorali dell'assemblea del CEM, appare due volte "**Relazione morale**: approvata con 40 sì, 1 no e 4 astensioni". Invece la seconda si riferisce alla "**Relazione finanziaria**", approvata con identico risultato. Ci scusiamo.

## **NOVA ELDONANTO POR "HEROLDO DE ESPERANTO"**

Ĝi estas unu el la plej malnovaj Esperanto-gazetoj. Dum la lastaj jaroj ĉe la nuna eldonanto ĝi ofte malfruis kaj havis problemojn.

Sed nun aperis espero pri ĝia revigliĝo: Fabricio Valle (*la antaŭa redaktoro de la revuo Esperanto*) kaj Paulo Lima, partneroj en la entrepreno "Sociala Grupo Lexus" en Brazilio eldonos ĝin ekde la jarkolekto 2017.

La ĝisnuna eldonanto Kooperativo de Literatura Foiro respondecas ankoraŭ pri la tuta jarkolekto 2016. La ŝanĝo ne koncernas la librojn, kiuj restas ĉe LF-koop.

## **PARTOPRENO EN PROJEKTO ERASMUS**

Daŭras mia sperto ene de "Erasmus+"; la internacia projekto financita, de eŭropaj fondusoj, kies partneroj estas ses esperantaj eŭropaj kluboj (Bialystoko, Reikjaviko, Skotlando, Munkeno, Bolonjo, kaj Verĉelo) kaj kies kialo estas la Trejnado de Trejnistoj.

Ĉio ĉi planita kaj organizita fare de Kosmo de Francesco Maurelli. Post mia vojaĝo al Bjalystoko okaze de la Zamenhofaj Tagoj dum decembro 2015, la pasintan monaton mi vojaĝis al Rejkjaviko kie mi havis la belan kaj feliĉan ŝancon konatiĝi kun kelkaj lokaj esperantistoj kaj viziti iom la urbon kaj la ĉirkaŭaĵojn.

Dum la unua renkontiĝo oni parolis pri la grupoj mem kaj iliaj malfortoj kaj eblecoj. Kontraŭe, la pasintan fojon oni komencis la veran laboron pri la trejnado. D-rino Sara Spanò faris tre interesan paroladon pri kio estas trejnado, kiaj estas la malsimilecoj inter trejnado, seminario, prelego kaj, precipe, kiaj estas la plej gravaj aspektoj ene de trejnado mem.

Persone, pluraj estas la kialoj kiuj instigas min partopreni tiun ĉi projekton. Unue la ŝancon lerni ion kaj iĝi mi mem iun tagon trejnisto; due la belan ŝancon vojaĝi kaj rekonti aliajn junajn esperantistojn kaj fine – sed ne malpli grava – havi kontaktojn kun aliaj italaj kluboj. Fakte, mi partoprenis en tiuj ĉi renkontiĝoj kiel reprezentanto de Verĉelo unue kaj de Bolonjo poste sed mia granda espero estas meti je la dispono de la milana klubo miajn estontajn kompetentecojn.

*Riccardo Lamperti*

## **LA KONGRESO DE LA ITALAJ KATOLIKOJ**

De la 3a ĝis la 7a de junio okazis la ĉijara UECI-kongreso en Assisi, ĉe la Monahinejo de Suore Francescane Missionarie di Maria.

La temo de la kongreso estis: "Mi volas sendi vin ĉiujn en Paradizon" (S-ka Francisko).

Dum la kongreso oni okazigis ĉiutagajn religiajn momentojn: matenajn laŭdojn, sanktan meson, rozarion, kaj kompletion vespere en la kapeleto de la Monahinejo.

Vendredon vespere alvenis tridek partoprenantoj.

La sekvaj tagoj estis okupitaj de multenombraj kulturaj kaj religiaj ekskursoj. La partoprenantoj vizitis la urbon Perugia kaj la ĉefajn preĝejojn de Assisi helpe de ĉiĉeroninoj kaj de la franciskana frato PierLuigi, estrarano de UECI.

Dimanĉon la kongresanoj vizitis la Sanktejon de la Kripo en *Greccio*, kie Sankta Francisko, en la kristnaska nokto de la jaro 1223, prezentis la naskiĝon de Jesuo per vivantaj personoj. Poste oni atingis la akvofalojn de *Le Marmore*.

Dum la kongreso Norma Cescotti kaj frato Pierluigi prelegis pri la temo de la kongreso.

La kongresejo situas tuj malantaŭ la baziliko de *S. Maria degli Angeli*; ĝi estas komforta kaj ĉirkaŭata de granda ĝardeno kun olivarboj, ĉerizarboj, vitejoj kaj floroj.

*Tiziana Fossati*

## **ESAMI FINALI DI 1° GRADO PER I RAGAZZI DI VERDELLO**

21 allievi, di cui 6 di origine straniera, della quinta classe della Scuola Primaria dell'Istituto comprensivo di Verdello (BG) hanno sostenuto l'esame finale di I grado il 20 maggio 2016. La scuola di Verdello ha ormai una tradizione consolidata nell'accostare i bambini all'esperanto. Il primo progetto di insegnamento dell'esperanto ai bambini risale al 2009. Tutto ciò è il frutto dell'impegno di Maria Carla Galizzi, presidente del gruppo esperantista di Bergamo, del samideano Felice Sorosina, e della passione e disponibilità dell'insegnante prevalente, Antonella Pignatello. Anche lei non ha voluto essere da meno dei suoi allievi e ha sostenuto con esito brillante l'esame finale.

La parte grammaticale è stata svolta da Maria Carla Galizzi, mentre Felice Soresina ha proposto ai ragazzi canzoncine, conversazioni e letture. Inoltre, nel corso dell'anno, gli alunni hanno potuto incontrare esperantisti sia italiani sia stranieri che li hanno intrattenute sui temi più vari, come ad esempio l'uso dell'abaco giapponese (Soroban), spiegato in esperanto dalla signora giapponese Kimie Markarian. L'esposizione ha suscitato il vivo interesse dei ragazzi, stupiti da come un così semplice strumento sia in grado di competere in velocità con le moderne calcolatrici.

È stata anche avviata una corrispondenza con altri ragazzi esperantisti della città di Gubin in Polonia. Un ulteriore dato positivo è rappresentato dal fatto che il progetto, dopo alcune perplessità iniziali, è stato ben accolto dai genitori che hanno potuto verificare come lo studio dell'esperanto faciliti anche l'apprendimento di altre lingue.

Per la Commissione di esame Il Direttore dell'Istituto d'Esperanto aveva nominato Giovanni Daminelli, Bruno Marcandalli ed Ermigi Rodari.

L'esame non è certo stato una formalità: i piccoli esaminandi sono stati impegnati per tutta la giornata e hanno dimostrato un grande entusiasmo, interesse e attenzione, il che fa ben sperare per una futura nuova generazione di esperantisti.

Come naturale, non tutti i ragazzi hanno dimostrato lo stesso livello di preparazione, ma, in generale, tutti sono risultati in grado di leggere, tradurre e sostenere semplici conversazioni; capiscono facilmente il senso di un brano proposto e si sono dimostrati sempre molto interessati.

*Bruno Marcandalli*

## **S-ANO CURNIS EN MILANO SURVOJE AL FRANCIO**

Kelkaj milanaj esperantistoj ĉeestis la prelegon de nia s-ano Marino Curnis ĉe "Gogol'Ostello - Caftè letterario" la 15an de junio. Pluraj el ni jam konas tiun eklektikan personon: li estas verkisto, poeto, eldonisto, laboristo pri plej diversaj metioj... Sed de tempo al tempo jen lia pasio; marŝi por ia idealisma celo. Oni ankoraŭ memoras lian marŝadon dum multaj monatoj de Bergamo ĝis la landlimoj de Irano, kies aŭtoritatoj ne donis la permeson daŭrigi la vojaĝon ĝis Japanio por porti mesaĝon de paco kaj frateco.

Ĉifoje la piedirado estas... pli mallonga: 2000 km de Romo al la franca urbo Amboise okaze de la 500a datreveno de la vojaĝo de Leonardo al Francio. Li ekstartis la 16an de majo kaj atingos Amboise'n la 17an de julio kun sia durada ĉareto. La celo estas historia (lin memorigi), politika (laŭ la sociala signifo de partopreno kaj sentemigo de ĉiuj al nia homa kaj socia vivo), kaj serĉadi retrovi survoje spurojn kaj ne tro konatajn dokumentojn pri

Leonardo. Je la fino oni kolektos kaj oni eldonos ĉion. Same pri "la Bisako", la nomo donita al la survoja kolektado de mesaĝoj senditaj de aŭtoritatoj, artistoj, konataj personoj kaj amikoj.

Bedaŭrinde ne estis eble aranĝi programon ĉe nia sidejo de CEM kvankam en Milano li programis unu el la maloftaj ripoz-tagoj. Sed ankaŭ dum la morgaŭa tago lia programo estis intensa: akceptado ĉe la Sforza Kastelo, poste ĉe la Muzeo pri "Scienco kaj Tekniko" kaj ĉe "Le Grazie" kun gastigado fare de la dominikanaj monaĥoj.

Kontraŭe la Esperanta Grupo de Pistoja sukcesis organizi du tre interesajn programojn en Vinci kaj en Pistoja, kune kun Arci: renkontiĝo ĉe la koncernaj muzeoj, prelego kaj bongustaj festenaj vespemanĝoj...

Similajn programojn oni organizis en Bologna kaj en la najbara Monteveglio kun ankaŭ publika akcepto kaj alnivelaj flankaj prelegoj prizorgitaj de d-roj Bolognesi kaj Cesta kaj de prof. Savini. En Milano ni povas nur bondeziri plenan sukceson al lia iniciato. Kaj lin sekvi ĉe <http://marinocurnis.altervista.org>

## **ĜEMELIĜAS TRI URBOJ KUN SIAJ E-GRUPOJ**

Breŝa Esperanto-Grupo kontente anoncas, ke la 10-an de junio 2016 la urbestroj de Breŝo Emilio Del Bono kaj de Troyes François Baroin subskribis la ĝemeliĝon inter la du urboj.

Tiu evento tre ĝojigas la breŝajn esperantistojn, kiuj jam de longe ĝemeliĝis kun la francaj geamikoj.

Tiu ĝemeliĝo plenumiĝis en la 25-a jarreveno de la ĝemeliĝo inter Breŝo kaj Darmstadt: ekde nun ekzistas oficiala "ĝemela triangulo" itala-franca-germana, kiu plenrajte postsekvas tiun, neoficialan sed efektivan, inter la tri esperanto-grupoj.

## **LUTTO**

La prof.essa Carla Sara Airoidi ci ha lasciati. Fedele associata da molti anni, la ricorderemo per la sua sensibilità e per il suo stile distinto e riservato che sempre l'ha caratterizzata.

Il C.E.M. e gli esperantisti milanesi partecipano al lutto dei familiari e della s-anino Franca Sara Airoidi.

## ESTRARKUNSIDO

La estrarkunsido de vendrede la 6an de majo ekis per la aprobo de la protokolo de la antaŭkunveno. Tuj poste oni disdonis la oficojn sekve al la voĉdonado dum la jarkunsido de la 15an de aprilo. Oni rekonfirmis d-ron Polerani prezidanto, la vicprezidanton d-ron Foà la sekretarion E. Rodari, d-ron Daminelli pri katedraj agadoj kaj la kursoj. Kiel nova kasisto revenis inĝ. Pranzo kaj la nova konsiliano d-ro Marcandalli helpas pri la pretigo de la bulteno. Sekve al la jarkunsida decido programi nian kluban vesperon jaŭde anstataŭ vendrede ekde venonta jaro, ekde septembro la ĉefa vespero de la monato, kun la picejo antaŭ la prelego, okazos jaŭde por alikutimigi la anojn, dum oni daŭros kun la kutimaj vendredoj. Poste venos la decido de kiam okazigi ĉion jaŭde. Pri la ĝojiga decido restarigi la "Traduka Rondo"n kaj traduki itallingve plurajn novelojn de Baghy por eldoni paperan aŭ retan libron, oni donis al la sekretario la taskon enketi ĉe UEA kaj s-ano Casini pri eventualaj aŭtorrajtoj. Oni bondeziris sukceson al la iniciatoj de s-ano Lamperti kunlabori kun kultura asocio "La valvola" kaj prizorgi sian retan TTTejon. Oni starigos ligilon inter ĝi kaj tiu de la klubo, al kiu ankoraŭ ne estis ŝanĝita la titolo, k.t.p. Pro tio la peto al d-ro Foà interesiĝi pri la problemo kunlabore kun inĝ. Pranzo. Poste la sekretario raportis pri la stranga konduto de ENEL Energia kun kiu oni subskribis kontrakton kiun ĝi poste ignoris pro "mankoj de datenoj" sen sciigi tion. Ŝajne nia nuna kontrakto kun A2A havas maltaŭgajn indikojn pri la utiligado: ni profunde pristudos la problemon. Same oni klopodos solvi la problemon pri la eraraj pagiloj pri la luado: ĵus alvenis informo pri kvar ne pagitaj monatoj dum la jaro 2016 kun la kutima eraro. La nekontentiga rezulto de nia informa gazebo en placo Argentina, kaj la rezigno de s-ano Gianni Conti ilin prizorgi en la estonto, pro siaj sanaj kialoj, aprobis la proponon de d-ro Daminelli haltigi tiujn iniciatojn. Laŭ la vicprezidanto Foà la plej taŭga ilo por konatigi Esperanton al neesperantistaj medioj estus organizi prelegojn pri ĝeneralaj temoj ĉe nia sidejo, informante pri ili pere de centoj da personaj ret-mesaĝoj. Estas kelkaj duboj pri tio sed oni petis al d-ro Foà provi aranĝi ilin.

E. R.

## NIAJ PASINTAJ VENDREDOJ

Nekutima gasto la 13an de majo ĉe ni: la japanino Kimie Markarian ilustris al la ĉeestantoj "sorobano"n, tute ne konata por la plimulto de ili. Sorobano estas historia abako kiu ebligas tujajn kaj precizajn kalkulojn. Ĝi estas genie aranĝita kaj permesas plenumi aritmetike kalkulojn sufiĉe komplikajn, male ol nia itala abako kiun ni konis dum nia infaneco. Krom la japana, kiu obligas per kvinoj, estas ankaŭ la ĉina sorobano kiu obligas per dekoj. Nia preleganto detale klarigis kiel oni utiligas ĝin, ankaŭ pere de multnombraj ekzemploj ofte kuntrenante la ĉeestantojn en la kalkulado. La prelego estis tre interesa pri tiu kurioza temo: certe nuntempe ekzistas la modernaj kalkuliloj kiuj tuj permesas pli rapidajn kaj altnivelajn utiligadojn.

Kun la teknika helpo de d-ro Daminelli, nia s-ano Ermigi Rodari la 17an de junio, vendrede, projekciis kaj komentis filmon kaj bildojn pri Nepalo. La kvardek-minutan filmon realigis kaj sonorigis la tre konata esperantista reĝisoro Roman Dobrzynski dum internacia renkontiĝo en tiu malproksima kaj tre interesa lando, tiel diversa por ni. Same pri la bildoj: kiam s-ano Rodari kaj aliaj milananoj partoprenis en unu el la famaj Himalajaj Internaciaj Renkontiĝoj. Ĉiam estis sinsekvo da bildoj pri mirindaj temploj kaj palacoj aŭ malriĉaj konstruaĵoj, pri folkloro vivo aŭ religiaj ritoj kaj kondutoj. Ĉio en esperantista etoso inter ges-anoj el diversaj landoj, gajaj kaj fratemaj. Je la fono belegaj panoramoj, altaj montoj kaj naturaj vidindaĵoj. Neforgesemaj bildoj, pluraj el ili ne plu videblaj post la terura pasintjara tertremo.

## TURISMO PER ESPERANTO <http://www.karavane.net>

La nota organizzazione turistica del s.-ano Aldo Foà (via Casale 7 - Milano, tel. 02.58111573, alle ore 17.30-19 di lunedì, mercoledì, venerdì; oppure sempre al 348 1709286 alle ore 10-19) comunica il suo prossimo programma estivo:

– **Viaggio in Giappone** dal 4 al 18 agosto. **Quota € 1890**

Un *itinerario approfondito* alla scoperta dei più caratteristici aspetti del Giappone: i **giardini zen**, i **templi buddisti e shintoisti**, gli ikebana, gli origami, le arti marziali, i samurai, gli shogun, le

**geishe**, le **terme** (onsen), il teatro tradizionale, la cerimonia del tè, la **cucina giapponese**, i **musei di arte moderna**, i **trasporti rapidissimi**, i grattacieli, i negozi e i divertimenti d'avanguardia.

– Anticipazioni: probabilmente si riuscirà ad organizzare per gli inizi del 2017 un **tour in Etiopia**, mentre il previsto viaggio a Mont St-Michel rimane rimandato ad altra data finché Autorità Francesi mantengono il proclamato Stato di Emergenza.

## NOTIZIE DAL MONDO

**Milano** – il 9 maggio il s-ano Ermigi Rodari ha tenuto alla Biblioteca Sant'Ambrogio una conferenza su "Esperanto. Quando, dove, chi... ma soprattutto perché". Presente un discreto numero di interessati, in prevalenza non esperantisti.

**Trieste** – La Associazione Esperantista Triestina ha festeggiato i suoi 110 anni il 16 giugno inaugurando la mostra "Filatelia e Esperanto" presso il Palazzo delle Poste.

**Rotterdam** – I "Komitanoj B" dell'UEA per prossimo triennio sono: Emílio Carlos Vaz Cid (Brasile), Mark Fettes (Canada), Maritza Gutiérrez González (Cuba), Stefan MacGill (Ungheria), Barbara Pietrzak (Polonia) e José Antonio Vergara (Cile).

**Lund (Svezia)** – Il periodico "Libera Folio" pubblica un'intervista a Chuck Smith, ideatore dei corsi di lingue in rete "Duolingo". Quello di esperanto è stato visitato in un anno da circa 400.000 persone. Circa una trentina al giorno hanno concluso il corso. Informazioni: <https://www.duolingo.com/course/eo/en/Learn-Esperanto-Online>

**Monaco** – Oltre 200 esperantisti da 20 nazioni hanno partecipato al 93° Congresso tedesco, distintosi per l'alto numero di conferenze.

**Quanzhou (Cina)** – L'8° Congresso Asiatico di Esperanto, dal 3 al 6 novembre prossimo, si svolgerà in questa città insieme al 5° ISOA (il Seminario dell'ILEI per l'Asia Orientale). Ulteriori informazioni: <http://www.esperantoazia.net/>

**Reggio Emilia** – Il giornale Prima Pagina Reggio ha pubblicato una esauriente intervista sull'Esperanto alla prof.ssa Savastano.

**Milano** – È uscita la 2ª edizione di "Corso Intensivo di Esperanto per allievi e autodidatti" di Pedro Aguilar Solà per favorire un suo

rapido approccio come lingua parlata. Con cento esercizi, e chiave di soluzione, e vocabolario di base. Acquistabile dalla FEI a € 7,50.

**Bologna** – Il 7 giugno il presidente Orsini ha tenuto un intervento pubblico al Museo Ebraico di Bologna dal titolo "Zamenhof e l'ebraismo: una lunga e complicata storia d'amore".

**Cracovia** – Alla più importante Università polacca, la Jagiellonian, un prestigioso riconoscimento dall'organizzazione internazionale EAQUALS per la qualità del suo insegnamento dell'Esperanto.

**Parigi** – È deceduto il prof. Michel Duc Goninaz, notevole figura di insegnante e di esperantista, autore di diverse opere, revisore del PIV e membro dell'Accademia di Esperanto.

**Baugè en Anjou** – La famosa Kulturdomo al Castello di Gresillon invita tutti a partecipare ai suoi vari e interessanti programmi estivi: culturali, linguistici, ricreativi, turistici. Per visionarli con tutte le informazioni visitare [www.gresillon.org](http://www.gresillon.org)

**Rotterdam** – Il prof. Probal Dasgupta è stato eletto presidente della Accademia di Esperanto, con i due vicepresidenti, Brian Moon e Otto Prytz, e il segretario Renato Corsetti. Altri membri: Orlando Raola (lingua), Sergio Pokrovskij (grammatica), Markos Kramer (vocabolario), Anna Lowenstein (insegnamento), Alexander Shlafer (lingua), Paul Gubbins (letteratura), Carlo Minnaja (storia della Accademia), Nguyen XuanThu (nomi propri).

**Chiavari** – Un buon successo ha riscosso la crociera a vela lanciata dal Gruppo Esperanto Tigullio. Anche articoli sui giornali locali.

**Milano** – Prosegue l'allestimento, a cura dell'infaticabile s-ano Gianni Conti, delle opere da installare nel paese di Castellaro, città dell'Esperanto, nel quadro della collaborazione in atto con le autorità locali. Un lavoro notevole e molto impegnativo.